

PONTO INTER POPOLOJ KAJ KULTUROJ

Jam pasis tri jardekoj post Showa 58 kiam mi studis en Nanzan Universitato en mezjapana urbo Nagoja. Mi ricevis stipendion de Verda Stelo Entrepreno kaj pro tio mi regule partoprenis ankaŭ la socian vivon en la japana Esperanto-movado. Tiel okazis, ke mi fariĝis esperantisto en Japanio. Mi preskaŭ ĉiusemajnfine vojaĝis al diversaj urboj kaj vilaĝoj inter Hokkajdo, la norda insulo kaj Ŝikoku, en la sudo, kaj prelegis pri miaj spertoj en scienco kaj kulturo.

Post la fino de mia japana studprogramo mi hejmenvojaĝis al Hungario, kaj laŭ la rezultoj de mia esplorkonferenco en Nanzan Universitato, mi doktoriĝis en la Budapeŝta Ekonomikoscienca Universitato. Tiam nur malmultaj hungaroj povis havi ŝancon studi en Japanio. Sekve de tio estis granda interesiĝo kaj en Hungario kaj en aliaj landoj kiel la japana ekonomio funkciis, kiel la japana komputila industrio estiĝis tiel sukcesa kaj kiel Japanio povis fariĝi la dua plej granda ekonomia povo de la mondo en la jaro 1968.

Multaj eŭropaj kaj aziaj ĵurnaloj, revuoj kaj aliaj periodaĵoj petis, ke mi verku artikolojn pri miaj spertoj. Mi verkis pli ol 150 librojn kaj artikolojn, kiuj aperis en diversaj naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto. Per Esperanto mi povis kolekti pli detalajn informojn ol la aliaj fakuloj ĉar mi rekte povis diskuti la temojn kun la esperantistaj fakuloj de la tuta mondo. Vidante, ke mi efike uzas Esperanton en mia laboro, mi ricevis pli ol unu milionon da enoj kiel kromsalajro de miaj laborejoj (de la Hungara Nacia Petrola Korporacio kaj la Parlamenta Kontrola kaj Aŭditorada Oficejo.)

Dum la pasintaj tridek jaroj oni organizis multajn sciencajn konferencojn en diversaj eŭropaj kaj aziaj landoj pri tiuj temoj kaj inter aliaj, la Ĉina Socioscienca Akademio kaj ankaŭ la Pola Akademio de Sciencoj invitis min prelegi pri niaj rezultoj en Esperanto, kiel ni intencas evoluigi nian ekonomion per la adapto de la japanaj ekonomiodirektaj metodoj.

Dumtempe la Hungara registaro, por la unua fojo en la Orient-Eropa Komunisma Mondo akceptis novajn regulojn kaj permesis, ke oni

fondu privatajn entreprenojn en la lando. Por informi skandinaviajn entrepreno-posedantojn kaj kuraĝigi ilin investi monon en Hungario mi vojaĝis al Svedio kaj prelegis pri tiu nova situacio en multaj universitatoj, urbodomoj, bibliotekoj, ktp. en la internacia lingvo. Tiel okazis, ke ankaŭ konkretan rezulton mi sukcesis atingi tie, la estroj de iu mezsveda industria korporacio petis, ke mi helpu fondi novan svedo-hungaran komunan entreprenon kaj petis, ke ankaŭ mi estu direktoro kaj posedanto de la nova entrepreno.

Tiel mi povas konkludi, ke kvankam mi studis rusan, anglan, francan, japanan kaj germanan lingvojn, tamen Esperanto riĉigis mian vivon la plej efike kaj per Esperanto mi povis konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj kaj kontinentoj.